

Joseph Freiherr von Eichendorff,

## La mesaĝisto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La steloj lumigas  
 Jen super la land'.  
 El for' salutigas  
 Vin via amat'.

Jen pendis ĉe l' pordo  
 gitar' sen atent'.  
 Eksonis la kordo  
 vibrigita de l' vent'.

La ĉeporda gitaro,  
 Ĝi estas mia kor'.<sup>2</sup>  
 Trans val' kaj montaro  
 Ĝi svingas sin for.

*Traduko de la Germana poemo "Der Bote" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2014-05-11.*

*Arg-1005-2033 (2014-05-11 11:58:32)*

*Tiu ĉi poemo estis publikigita en la revuo "Dia Regno", n-ro 2 (905) el la jaro 2014. Pri la poeto Joseph von Eichendorff vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph\\_von\\_Eichendorff](http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff).*

---

<sup>2</sup>aŭ:Ja estas mia kor'.